

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Dritter Jahrgang



Nr. 10, Oktober 1950

Der Kölner Regierungspräsident

Wegbereiter für Esperanto

Im Amtlichen Schulblatt für den Regierungsbezirk Köln — Nr. 12 vom 19. Juni 1950, Seite 112 — ist eine Mitteilung des Regierungspräsidenten in Köln vom 26. Mai 1950 enthalten, in der die Lehrerschaft auf die große Bedeutung des Esperanto als Welthilfssprache hingewiesen wird.

— In der Mitteilung heißt es weiter:

„Aus bescheidenen Anfängen heraus hat die Esperanto-Bewegung durch die unermüdete Pionierarbeit von wenigen friedenswollenden Idealisten in nur 60 Jahren eine weltweite Verbreitung gefunden. Auch bei den Verhandlungen der UNO und der UNESCO spielt Esperanto eine Rolle. Von zahlreichen Regierungen wird es gefördert. In Amerika, Kanada, England, Frankreich, der Schweiz, Italien, Griechenland, Österreich, Japan, Neuseeland wird es in öffentlichen Schulen gelehrt. Außerdem ist es Studienfach an Universitäten der meisten dieser Länder sowie in Brasilien, Argentinien, China und auch in Deutschland, wo es an der Universität und an der Technischen Hochschule München sowie an der Universität zu Hamburg gelehrt wird. Seit Jahren halten viele deutsche Volkshochschulen erfolgreiche Esperanto-Lehrgänge. Es ist zu begrüßen, wenn auch die Lehrerschaft aller Schulgattungen sich für das Anliegen der Esperanto-Bewegung aufgeschlossen zeigt. Denn sie dient wesentlich auch der Sache des Friedens, dem wir alle dienen wollen.“

Die Gewerkschaften und Esperanto

Von Josef Hajek, Lehrer i. R., Ernsthofen/Odenwald

Während sich die Gewerkschaften früher nur wenig um die Welthilfssprachenfrage und um Esperanto kümmerten, scheint es nun nach dem 2. Weltkrieg durch die rasch zunehmende Verbreitung dieser Kulturangelegenheit in der Welt auch bei uns anders zu werden.

Gerade die letzten Kriegsjahre haben vielen die Augen geöffnet und ihnen gezeigt, daß auch der Sprachenwirrwarr eine große Schuld am Weltkriege trägt; denn Völker, die sich nicht verständigen können, sind geeignete Objekte für eine Kriegführung.

Die Gewerkschaften, die mit zu den stärksten Friedensfaktoren gehören, sind sich der Tatsache wohl bewußt, daß die Verständigung der Völker auf internationalen Kongressen nur unvollkommen ist, da eben die einheitliche Verhandlungssprache fehlt.

Um diesem Übelstand abzuwehren, und auch aus anderen wichtigen Gründen, die in den unten angeführten Bittschriften enthalten sind, haben die Gewerkschaften beschlossen, Esperanto zu fördern.

So sandten sie und auch andere Organisationen wegen Unterstüt-

zung des Esperanto Bittschriften an die UN (Vereinte Nationen) mit folgendem Wortlaut:

1. Der Bayerische Gewerkschaftsbund erachtet das Problem einer internationalen Sprache zur Förderung sozialer Fortschritte als unterstützungswert. Er begrüßt daher das zunehmende Interesse für die Welthilfssprache Esperanto unter der gewerkschaftlich organisierten Arbeiterschaft, weil dies einen wertvollen Beitrag zur internationalen Verständigung der Völker untereinander bedeutet.

2. Die Gewerkschaften der französischen besetzten Zone unterstützen die Bestrebung, eine Welthilfssprache einzuführen, weil sie der Auffassung sind, daß damit eines der größten Hindernisse zur Völkerverständigung beseitigt wird. Wir sehen in der praktischen Anwendung einer Welthilfssprache eine Förderung internationaler Interessen der politischen und gewerkschaftlichen Arbeiterbewegung. Alle Staaten sollten ein Interesse daran haben, Esperanto als Pflichtfach in den Schulen einzuführen...

3. Der Deutsche Gewerkschaftsbund (Brit. Besatzungszone) begrüßt mit

Interesse die Bestrebungen zur Verbreitung einer Welthilfssprache innerhalb weitester Kreise der Bevölkerung. Im Hinblick auf die in anderen Ländern bereits erzielten Fortschritte, welche Esperanto unter der gewerkschaftlich organisierten Arbeiterschaft erzielen konnte, erblickt der Deutsche Gewerkschaftsbund in der Verbreitung...

4. Der Freie Gewerkschaftsbund Hessen erachtet die Einführung einer internationalen Sprache für unterstützungswert...

5. Der Landesverband Bayern der sozialdemokratischen Partei Deutschlands erachtet das Problem einer internationalen Sprache als wichtige und ernsthafte Angelegenheit und schenkt ihm größte Aufmerksamkeit. Das rege Interesse, welches in den Kreisen der Arbeiterschaft für die Welthilfssprache Esperanto zu beobachten ist, findet weitestgehende Unterstützung... Dies kam auch in der beim Nürnberger Parteitag der Sozialdemokratischen Partei Deutschlands 1947 gefaßten Entschließung bezüglich der Welthilfssprache Esperanto zum Ausdruck.

Die Arbeiter selbst haben ihre eigenen Esperanto-Kongresse. Ihre Zeitung „Sennaciulo“ tritt für die Interessen der Arbeiterschaft der ganzen Welt ein. Näheres über die Weltorganisation der Arbeiter-Esperantisten bei L. Puff, Frankfurt a. M., Heerstr. 85.

Die Arbeiter-Esperantisten sind überzeugt, daß durch eine Welthilfssprache auch die Demokratie und die Idee des Sozialismus zum Wohle der Menschheit um so eher verwirklicht werden können.

Das offizielle Organ der britischen Unabhängigen Arbeiterpartei „The Socialist Leader“ enthält Artikel in Esperanto und einen Aufruf an die englischen Arbeiter, Esperanto zu

In der nächsten Nummer:

Bad Nauheim ehrt Dr. Zamenhof

Frieden und Esperanto

Esperanto-Neuigkeiten

Lingva Konsilejo

Helga und ich

Die EP-Rakete

Alibioj



Tio estas nia egipta samideano D-ro Tadros Megalli el Kairo, multe aplaudata prelegisto pri sia hejmlando en Skandinavio. (Foto: Müller)

Malbenitaj limoj!

Denove someraj feriaj kursoj en la belega urbo Helsingör vekas deziron partopreni. Jam en printempo mi petis la danan konsulon en Hamburgo pri permeso viziti Danion. Kiam mi pensis, ke la afero jam baldaŭ estos en ordo, mi post pli ol kvar semajnoj ricevis la unuan respondon: estis nur demandfolioj. Nun mi sciis, ke ankoraŭ ekzistas la samaj malfacilaĵoj kiel en la pasinta jaro, kaj timis.

La semajnoj pasis, kaj per eleganta dana buso iutage en afabla societo de danaj gesamideanoj, kiuj revenis de feria vojaĝo el Tirolo, Italio kaj Sudgermanio, mi veturis Hamburgo, por tie akcepti la vizon. Sed estis sabato kaj posttagmezo, la konsulejo jam ŝlosita.

Nun, kion fari? Sed en Hamburgo ja vivas nia konata s-ano August Weide. Li tre ĝojis, kiam mi subite staris antaŭ lia pordo. Liaj edzino kaj infanoj estis vizitantaj Danion, kaj nun ni ambaŭ vivis kiel fraŭloj. Dimanĉon ni komune manĝis en fiŝrestoracio, kaj poste kun miloj da Hamburganoj ni faris ekskurson al mondfama Blankenese por trinki kafon kaj bani en la riverego Elbo.

Die Gewerkschaften und Esperanto (Schluß)

lernen. Die Gewerkschaften stellen zum Teil Lehrmittel kostenlos zur Verfügung.

Der Niederländische Gewerkschaftsverband gibt ein monatliches „Informa Bulteno“ in Esperanto heraus, welches das Ausland mit den holländischen Gewerkschaftsfragen vertraut macht.

Zusammengefaßt: Gewerkschaften und Esperanto sind Friedensinstrumente, die sich gegenseitig nützen und zusammen dem Weltfrieden unschätzbare Dienste leisten.

Lundon mi denove iris al la konsulejo, sed oni diris, ke la paperoj ankoraŭ estas en Kopenhago. Mi forlasis la konsulejon kaj malgaje tramigradis la stratojn de la grandurbo. Cu ok ĝis dek semajnoj fakte ne sufiĉas por prizorgi vizon? Kial tiaj malfacilaĵoj? Malbenitaj limoj! Cu la burokratoj havas la kulpon? Bedaŭrinde la ofica blank-ĉevalaĉo estas rajdata ĉie!

Mi intencis revojaĝi, sed amiko polica inspektoro Weide telefonis kun konata dana oficisto, kiu promesis serĉi; kaj li trovis la vizon. Nun mi ĝojegis, sed denove estis posttagmezo kaj la konsulejo fermita. Oni ne devas fari esceptojn, ne, ne. Mi denove perdis tagon, sed mardon, post duhora atendado, mi finfine kun feliĉa koro forlasis la konsulejon, kaj multaj aliaj atendantoj enviis min.

Ek al la stacidomo! Baldaŭ la rapidvagonaro portis min al la limo. Flensburg—Padborg, multaj vojaĝantoj dormis, sed la limoficisto tamen faris sian devon kaj kontrolis paperojn, pakajojn kaj monon. Post longa atendado la rapidvagonaro denove ekmovigis, la lokomotivo ĝemegis: „Kopenhagon, Kopenhagon...“

Baldaŭ mi dormis kaj ne rimarkis la transveturon trans Grandan Belton. Kiam matene duonon post la oka en Helsingör la partoprenantoj de la feriaj kursoj forlasis la manĝejon, mi alvenis per taksio de la stacidomo. Gajaj vizaĝoj, manpremoj, malgraŭ multaj malfacilaĵoj mi estis en Esperantujo. Tuj mi ricevis ĉambron, freŝigis min, matenmanĝis la bonan danan avenkaĉon ktp. kaj sidis baldaŭ en rondo de gelernantoj por aŭdi la ŝercojn, la gramatikajn klarigojn, la literaturajn prelegojn de la vigla Morariu el Stokholmo kaj la historiajn prelegojn de la eminenta fraŭlino Noll el Kopenhago. Si ankoraŭ konis la majstron kaj korespondis kun li, ŝi alfrontis la danan profesoron Jespersen, kiu unue estis esperantisto, poste fariĝis ldisto kaj fine forlasis ldon por propagandi propran sistemon „Novial“.


En Helsingör mi travivis belegajn tagojn en vera rondo familia. Cesis 150 partoprenantoj el dek diversaj nacioj. Mi loĝis kune kun svedo, nederlandano kaj egipto, kvar diversaj nacioj, kvar diversaj vizaĝoj, kvar diversaj profesioj. La egipto estis Dr. Tadros Megalli, Kairo, kiu jam antaŭe travojaĝis Svedion, Danion kaj ĉie prelegis pri sia hejmlando kaj rikoltis bonan aplaŭdon. Cie kaj ĉiam lia ruĝa fezo vekis atenton.

Posttagmeze oni aranĝis ekskursojn, banis aŭ popoldancis sur la herbejo. Oni ankoraŭ intencis vojaĝi Svedion. Sed mi, mi trastudis mian pasporton kaj konstatis, ke la anguloj ne permesis vojaĝi tien. Denove la limo! Kion fari? Pasintan jaron mi rezignis; nun mi havis la deziron provi, sed kiel?

Oni konsilis al mi, iri al la dana havenpolico. Post longa babilado la policistoj opiniis, ke mi provu, sed la svedoj estas treege severaj kaj certe ne enlasos min. En la vespero antaŭ la vojaĝo mi renkontis samideanon el Helsingborg, Svedio, al kiu mi rakontis pri miaj deziro kaj malfacilaĵoj. Li diris: „Mi ankoraŭ hodiaŭ revojaĝos al Helsingborg kaj parolos kun la estro de la sveda polico. Mi esperas, ke mi atingos permeson por vi.“ Ni ŝanĝis la adresojn kaj post danko mi dormis baldaŭ bone kaj sonĝis pri la bela Svedio.

Sed venontan matenon denove malfacilaĵoj. La deĵoranta dana policisto ne volis doni al mi permeson supreniri la pramon. En la lasta momento, kiam li aŭdis, ke mi venis de la popolalternejo Helsingör, li diris: „Vi povas veturi kaj ĝui la bonan vidon, sed la svedoj certe ne donos al vi permeson kaj vi tuj revenos per venonta pramo.“ Mi nun povis ĝui la bonan aspekton de la sveda kaj dana marbordoj, ĉar estis belega dimanĉmateno, la suno brilis. En Helsingborg mi forlasis la pramon kaj kun scivolemo mi iris al la barilo kaj montris mian pasporton kaj la adreson de la sveda samideano. La afabla sveda oficisto jam estis informita kaj tiel mi ricevis permeson per helpo de Esperanto.

H. Müller.



Helsingborg, la sveda havenurbo kontraŭe al la dana urbo Helsingör. (Foto: Müller)

Esperantist, erkenne deine Macht!

So stand im Januarheft der *Ponto* zu lesen.

Sind wir denn nun wirklich eine Macht?

Geben uns die dort genannten Zahlen ein Recht, von Macht zu sprechen?

5 000 Bundesmitglieder, mindestens 20 000 deutsche Esperantisten, 7 000 000 Deutsche, die mal als Masse eine Bittschrift für Esperanto an die UNO sandten.

Und der Erfolg?

Man hält uns auch heute noch nicht für wichtig. Woran liegt das?

Wir haben tatsächlich schon eine Macht, aber wir haben Angst, sie anzuwenden.

Im 3. Absatz des *Ponto*-Artikels stehen zwei Gedanken, die wesentlich sind.

- a) Die Welt beurteilt eine Idee nach ihrem praktischen Nutzen,
- b) die Bedeutung einer Organisation wächst mit der Höhe des Kapitals, das darin steckt, nicht dahinter steht.

Hinter unserem Bund steht wohl kein Kapital, er ist froh, wenn er seinen Verpflichtungen nachkommen kann.

Aber was für ein Kapital steckt denn darin?

Momenton, mi petas!

5 000 Bundesmitglieder verbrauchen monatlich für sich und die Ihren je 50.— DM.

20 000 Esperantisten in Deutschland tun wahrscheinlich dasselbe, auch je 50.— DM, darin sind die obigen 5 000 Anhänger enthalten.

Jetzt rechnen Sie bitte: $20\,000 \times 50. = 1\,000\,000$ DM, stimmt's? Aber diese Million DM wird nicht beachtet, solange sie in Ihrer Brieftasche liegen. Oder haben Sie schon mal etwas davon bemerkt, daß sich die Welt darum aufregt?

Doch in dem Moment, in dem Sie sie ausgeben, da bekommt sie die Wirtschaft, der Kaufmann oder der Hersteller, und dann ist das Geld verwandelt, es sind Umsätze geworden.

Die Wirtschaft kann aber nur vom Umsatz leben. Sieht man nicht tagtäglich, wie man um diesen „Umsatz“ kämpft? Ob es sich um Kaffee oder Schuhe, um Würstchen oder Autos, um Hausrat oder Maschinen handelt, immer geht es um den Umsatz.

Und — Sie werden lachen — Sie 20 000 Esperantisten haben diese Millionen-Umsätze in Ihrer Hand.

Vergessen Sie nicht, 1 Million im Monat sind 12 Millionen im Jahr. Und auch diese Zahl vermehrt sich noch um das, was Esperantisten als Inhaber oder Angestellte in den Betrieben an Aufträgen zu vergeben haben. Lenken Sie doch diese Millionen-Umsätze an die Wirtschaftsmenschen oder Unternehmen, die für Ihre Käufe im Esperanto-Sinne auch dankbar sind. Hausfrauen, immer daran denken!

Sie könnten z. B. aktives oder förderndes Mitglied Ihres Esperanto-Klubs werden,

oder zwanglos mal ein Sümchen springen lassen (eine Nachbargruppe hat auf diese Weise etwa 800.— DM zusammengebracht),

oder Ihr Arzt oder Zahnarzt könnte in seinem Wartezimmer die Esperanto-Post auflegen,

oder Hersteller und Großhändler könnten in der Esperanto-Post eine Anzeige aufgeben (Kaufleute, vergebst das nicht!),

oder alle Vereinswirte müßten automatisch Mitglieder werden, denn das sind doch die Leute, die an uns verdienen, warum also schüchtern sein? Klubleiter, keine Angst, die Wirte warten darauf.

Es gibt noch mehr Möglichkeiten. Doch genug der Worte für heute! Und wie sieht die Tat aus?

Bei jedem Kauf sich fragen: wie steht der Mann zu Esperanto? Wenn

ein Kaufmann in der Esperanto-Post inseriert, dann prüft man sein Angebot oder fragt an.

Man versucht es mal mit dem Zahnarzt, bei dem die Esperanto-Post ausliegt. Mit einem Wort: Wir Esperantisten halten zusammen, besonders, wenn es um unsere Geltung geht.

Dann können wir sagen, Wir sind wer!

Und dann sagt der Landeskultusminister, die Bundesregierung, der Europa-Rat: Ja, wenn das so ist, wenn Ihr Euch selbst helft, dann müssen wir ja wohl auch Euch helfen. Do, gesamideanoj, bedenket immer: Das Trägheitsgesetz der Natur lautet: ein Ding bleibt solange in seiner Lage, bis es durch eine Kraft aus ihr verdrängt wird.

—Waro—

La grandaj Figuroj de l' Homaro en la kadro de la kalendaro OKTOBRO

En tiu ĉi monato naskiĝis

- 1466 Erasmus de Roterdam (Gerhard Gerhards) — plej grava humanisto
- 1472 Lucas Cranach — germana pentristo kaj ksilografo
- 1477 Tiziano Vecelli(o) — fama itala pentristo
- 1547 Miguel de Cervantes Saavedra — plej granda hispana poeto kaj verkisto
- 1684 Jean Antoine Watteau — franca pentristo
- 1713 Den's Diderot — franca enciklopediisto
- 1726 Daniel Chodowiecki — germana gravuristo kaj pentristo
- 1728 James Cook — angla mond-esploristo
- 1757 Freiherr von und zum Stein — germana ŝtatviro
- 1762 André Chenier — franca poeto.
- 1777 Heinrich von Kleist — germana poeto kaj verkisto
- 1797 Jeremias Gotthelf (Albert Bitzius) — svisa verkisto
- 1801 Albert Lortzing — germana komponisto
- 1805 Adalbert Stifter — aŭstra verkisto
- 1811 Franz Liszt — german-hungara virtuozo kaj komponisto
- 1813 Georg Büchner — germana poeto
- 1813 Giuseppe Verdi — itala komponisto
- 1814 Miĥail Jurjeviĉ Lermontov — rusa poeto
- 1815 Emanuel Geibel — germana poeto
- 1820 Jenny Lind — sveda kantistino
- 1821 Rudolf Virchow — germana medicinisto
- 1825 Conrad Ferdinand Meyer — svisa verkisto kaj poeto
- 1825 Johann Strauß — plej fama aŭstra danc-komponisto
- 1827 Arnold Boecklin — svisa pentristo
- 1835 Camille Saint-Saëns — franca komponisto
- 1838 Georges Bizet — franca komponisto
- 1839 Hans Thoma — germana pentristo

- 1844 Wilhelm Leibl — germana pentristo
- 1844 Friedrich Nietzsche — germana filozofo kaj poeto
- 1854 Jean-Arthur Rimbaud — franca poeto
- 1856 Oscar Wilde — angla verkisto
- 1859 Eleonora Duse — itala aktorino
- 1861 Fridtjof Nansen — norvega esploristo
- 1869 Mahatma Gandhi — hinda popolgvidinto
- 1881 Pablo Picasso (Ruiz y P.) — hispan-franca nuntempa pentristo

En tiu ĉi monato mortis

- 1469 Fra Filippo Lippi — itala pentristo
- 1531 Ulrich Zwingli — svisa reformatoro
- 1553 Lucas Cranach — germana pentristo kaj ksilografo
- 1669 Rembrandt Harmensz van Rijn — plej fama nederlanda pentristo kaj desegnisto
- 1684 Pierre Corneille — franca dramisto
- 1716 Gottfried Wilhelm Leibniz — germana sciencisto kaj filozofo
- 1764 William Hogarth — angla pentristo kaj desegnisto
- 1822 Antonio Canova — itala skulptisto
- 1849 Frédéric Chopin — pola komponisto
- 1849 Edgar Allan Poe — nordamerika poeto kaj verkisto
- 1854 Jeremias Gotthelf (Albert Bitzius) — svisa verkisto
- 1859 Ludwig Spohr — germana komponisto
- 1874 Peter von Cornelius — germana komponisto kaj poeto
- 1892 Alfred Tennyson — angla poeto
- 1896 Anton Bruckner — aŭstra komponisto
- 1906 Paul Cézanne — franca pentristo
- 1924 Anatole France (Jacques A. Thibaut) — franca verkisto kaj poeto universala
- 1929 Arno Holz — germana poeto
- 1931 Thomas Alva Edison — usona inventisto

Aktuala Terminareto

Sommerschlußverkauf, somera finvendado
 Ringelsöckchen, ringe striitaj ŝtrumpetoj
 Laufmasche, dismasaĝo
 Sweater, jerzo
 Baskenmütze, vaska ĉapo
 Heuschnupfen, fojnkataro. -febros
 Hexenschuß, lumba doloro
 Virus, viruso
 Kartoffelkäferbekämpfung, batalo kontraŭ la terpomskarabo
 Gefrierfleisch, glaciviano
 Tiefgekühltes Gemüse, glacilegomo
 Kühlschrank, malvarmiga ŝrank(et)o
 Eisschrank, glaciŝrank(et)o
 Füllbleistift, aŭtomata krajono
 Druckbleistift, premkrajono
 Drehbleistift, turnkrajono
 Trickfilm, desegnita filmo
 Bühne, Kribbe, kontraŭflua digo, enrivera ~
 Wasserdicht, akvo-fortena
 Luftdicht, hermetika
 Der Fahrradschlauch hält die Luft, la aertubo tenadas la aeron
 Sicherung, (elektrisch): (cirkvit)gardilo
 Glühbirne, ampolo

Fassung, ampolingo
 Netz, (elektrisch): distribu-linio
 Leitung, kondukilo
 Schalter, konektilo
 Steckdose, ŝtopilingo
 anpeilen, alceli, biri (laŭ Encikl. Vortaro)
 Ortung, lokalizado
 (Auf)rüstung, armado
 Luftwaffe, aer-armeo
 Raketengeschoss, raketa pafajo
 Atommeiler, -ofen, atomforno
 Bombensicher, bombsekura; tutcerte, certege
 Notkirche, provizora preĝejo
 Bekenntnisschule, konfesia lernejo
 Gemeinschaftsschule, Simultan-, ambaŭkonfesia lernejo
 Schlagwort, slogano
 Schlagzeile, sensaci-linio, ĉeflinio
 Messeschlager, foira sensaci(aj)o, ~ sukcesaĵo
 Papierkrieg, formularismo, -emo
 Passionsspiele, pasionaj (nicht: Pasiaj) ludoj
 Negerspirituals, negrokantikoj
 Korekto de preseraro el n-ro 7, pĝ. 6t: Nylon: nilono.

Hans Wingen

Respondo al demando 2 (EP 5)

Mi pensas, ke la demando 1 jam estas ankaŭ respondita per la respondo al demando 2 (EP 6, pĝ. 49). „Nune“ estas adverbo de „nuna“. Oni povus diri, ke ĝi pli emfazas la estantan tempon ol la simpla „nun“. Sed pri tio oni povus diskuti. JTB.

Videant consules!

Anläßlich des diesjährigen Esperanto-Weltkongresses in Paris tauchte die Bildung „interkona vespero“ auf; gemeint ist „interkonatiga“ bzw. „interkoniga vespero“. Interkoni heißt „untereinander kennen“, genau wie interŝanĝi, interparoli und interligi mit oder untereinander tauschen usw. bedeuten. Man kennt sich aber vielfach noch gar nicht; dagegen will man sich kennen lernen, miteinander bekannt werden. Dieses „werden“ wird durch „igi“ ausgedrückt und ist bei der Wort- und Begriffsbildung unerlässlich.

Diese Sprachvergewaltigung durch eine widersinnige Wortkurzform führt zur Sprachverhuzung und zur Sprachverluderung, wie sie schon mehrfach festgestellt werden konnten. Das „Prinzip des Genügens“ kann hier nicht angewandt werden, weil ein zum klaren Wortsinverständnis notwendiger grammatischer Bestandteil nicht ausgelassen werden darf. Will man einen Sprachcode schaffen, zu dessen Entzifferung ein Schlüssel erforderlich ist? Wie wäre es da mit der Kurzform „mo“? Ein Kopf und ein Bein, den Rumpf hat man wegoperiert. Je nach Bedarf und Belieben kann mo mano, mino, mieno oder mono bedeuten.

Mehr gesundes Sprachgefühl, mehr Liebe zur Sprache, mehr Ehrfurcht vor ihr! Sonst: Videant consules!

M. Butin

LINGVA KONSULTEJO

-antas . . -atas

La ĉi-suban kontribuojn iom mallongigitan ni publikigas jam pro tio, ke la verkinto demandis: „Ĉu vi riskus proponi miajn formojn por diskuti ilin en Esperanto-Post?“ Cetere, ili ne estas tute novaj (vidu la rimarkon ĉefne), tamen ili povas postuli certan atenton, ĉar ili pritraktas unu el la plej interesaj flankoj de nia gramatiko. — Red.

... Laŭ mia opinio la logiko en Esperanto havas breĉojn, nome en la kunmetitaj formoj. Mi provos pruvu mian aserton.

Ni povas uzi la verdire superfluaĵojn formojn: Mi estas vokanta, vokinta ktp.

Certe necesaj estas: Mi estas — estis vokinta ktp., mi estas — estis estinta. Sed ĝis nun mi trovis en neniu libro ĉi tiujn formojn. Ich habe gehabt = „mi estas havinta“ estas sensecaĵo, „mi havas havinta“ nebla, ĉar ni uzas nur la helpverbon „esti“.

„Ich habe gehabt“ ktp. kaj „ich bin gewesen“ ktp. ne estas absolute necesaj, sed ili pliriĝigus la lingvon.

Mi estas konstatinta, ke la kunmetitaj tempoj faras multe da malfacilaĵoj por la lernantoj. Krome la lingvo estas per tio iomete rigida.

Verdire oni ne bezonas la helpverbon „esti“. Jen la pruvo:

Aktivo

Mi estas vokanta = mi vokantas
 Mi estis vokanta = mi vokintas
 Mi estas vokinta = mi vokantis
 Mi estis vokinta = mi vokintis
 Mi estos vokanta = mi vokontas

Pasivo

Mi estas vokata = mi vokatas
 Mi estis vokata = mi vokitatas
 Mi estas vokita = mi vokatis
 Mi estis vokita = mi vokitis
 Mi estos vokata = mi vokotatas

La lernanto ne devas „pensumi“: Ich hatte gerufen = ich war gerufen = mi estis vokinta, sed: mi vokintis. Krome mortos la stranga: Ni estis vokintaj = ni vokintis.

Ĝis nun ĉiuj komencantoj kaj lernantoj „salutantis“ mian proponon pro ĝia facileco, kaj la spertuloj skuis la kapojn. Nu, ili devos „lernumi“. W. Kindermann, Reskerode.

Rim. de red. — „Laŭdatu Jezu-Kristo“ (Grabowski, Pan Tadeuŝ VI, 604). Al tio diras „Plena Gramatiko“, eldono 1935, pĝ. 189:

Tia kunmetado estis tiel konforma al la konstruo de la lingvo, ke ĝi estis plurfoje kaj plurorigine proponita. Tamen ĝi neniam prosperis en la komuna lingvo pro la malfacilo de uzado kaj kompreno, kiun kaŭzas la ekzisto de triobla partcipa sufikso . . . Nur unika (= ununura — red.) sufikso montranta sole la pasivecon, estus povinta enradikiĝi.

Cetere ni lasas al niaj legantoj ĉian liberecon esprimi sian opinion.

Frage Nr. 6

Ich bitte um Übersetzung folgender Wörter:

Flüchtige, verschleppte, vertriebene, verdrängte, ausgewiesene, verbannte Personen; Flüchtling.

Beko.

Demando n-ro 7

En diversaj gazetoj mi legis foje „lingvuzado“, foje „lingvouzado“

Eine Rakete

der EP startet zum Flug um den Erdball

Ja, liebe Leserschar der EP, Sie staunen, doch Sie haben recht gelesen: die EP will eine Rakete zum Flug um die Erde loslassen. Aber — und das brauchen wir doch nicht besonders betonen! — es soll natürlich ein friedlicher Flug werden. Er soll eine Propaganda-Umkreisung unseres Globus sein, bei der wir nur den Ruhm unseres Esperanto im Auge haben. „Ad maiorem Esperanti gloriam“, das soll unser Leitspruch sein.

Sie meinen, wir sollen nicht so viel Vorrede machen, Stimmt, Sie haben ganz recht. Also hören Sie bitte unsern Plan.

Sie erinnern sich noch unseres Wettbewerbs „Aufblick zum Sternenhimmel“? Dort wollten wir beweisen und haben es auch getan, daß ein Gedicht in deutscher Sprache, das sich mal in Esperanto kleidet und dann wieder die ursprüngliche Gewandung anzieht, nach wie vor fast unverändert bleibt. Diesmal geht unser Ziel weiter. Wir wollen einen größeren, nicht leichten Text rund um die Welt schicken. Von einer Sprache soll er sich in die andere wandeln, ein modernes Chamäleon, und am Ende soll er doch als der alte wieder bei uns erscheinen. Er wird es auch, das hoffen wir bestimmt. Das soll unsere friedliche Rakete sein, und ihren Flug sollen alle unsere Leser mitbegleiten. Wir werden jeweils die Standorte und Reiserouten bekanntgeben, wo sich die „Sprachrakete“ gerade befindet. Eine bestimmte Zeit zur Umkreisung unseres Planeten ist nicht vorgesehen, aber gemäß dem Tempo unserer Zeit soll die Reise sich auch nicht allzu lange ausdehnen. Doch das sehen wir schon noch! In nächster Nummer folgen die allgemeinen Reiseanweisungen, und am 1. Dezember 1950 geht der Startschuß los. Also bitte noch etwas Geduld!

nia esprimo elvokos lian nehaltigeblan koleron. Sed la plej grava taktika eraro estus, uzi ambaŭ sufiksojn alterne. Tio estus certa rimedo, indignigi lin.

La situacio ŝajnis senelira. Sed — naskiĝis tria skolo: la ruzala skolo. Ili ne volis kvereli kun ambaŭ partioj, la ujistoj kaj la iistoj, kaj tial ili uzis — oni povas diri: hipokrite — por la lando la vorton: lando. Germanlando. Sed kun ĝojo oni povas konstati, ke la aliaj divenis ilian ruzecon kaj kondamnis ilin: fisenpartiaj nedecidigemuloj, oportunistoj senkarakteraj ktp. Malgraŭ tio la skolo kreskadis. Ŝajne ĝiaj aliaj estas ankaŭ harditaj insultalkritimigintoj.

De, regas kaoso. (Kvankam sufiĉe simpla kaoso: Oni uzu -ujo, aŭ se tio ne plaĉas al oni, laŭvole -io aŭ lando en la samaj kazoj.) Sed nun la solvo estas trovita! Ĝi estas same simpla kiel konsterna. Sed la grandaj faroj ja ĉiam estas simplaj. Kaj ĉi tiu granda faro troviĝas sur la 17-a paĝo de antaŭe (28-a de malantaŭe) de la nunjara kongreslibro germana. La solvo estas: Germanico. Jes, simple kaj kolose: Germanico. Bedaŭrinde ĝi ne estas lingve aprobita. Sed tamen bonega. Ĉu vi ne miras? Ĉi tiu vorteto entenas sur malgranda spaco la plej diversajn meritojn: Ĝi evitas la nuran -i- de Germanio, malamatan de la parto a) de la burĝoj kaj parteto de la laboristoj. Samtempe ĝi evitas la hiaton i/o. Kaj -ico evitas konfuzojn kun la tabelvorto io! Germanio = german-io = germano-io: kontraŭargumento ne tre senechava, sed tamen konsiderinda. — Ĝi, due, evitas la -ujon de Germanujo, malamatan de la cetero de la esperantistaro, kaj kiu, kiel SATanino iam diris al mi, sonas, kvazaŭ nia lando estus skatolo.

Mi siatempe respondis, ke nia lando efektive estas skatolo, el kiu

ni ne povas eliri. Sed tiu klarigo ne taŭgas por la aliaj ujoj, pardonu, — landoj, kiel ekzemple Anglujo. Ili ankaŭ ne estas arboj, sur kiuj kreskas la angloj, germanoj ktp. Do, -ico estas nepre preferinda. — Trie, -ico estas multe pli mallonga ol -lando. Jes ja, tiu miriga malgranda plaĉa iceto! Kiom da avantaĝoj ĝi entenas! Samtempe Germanico tiel agrable memorigas la histori-konanton pri la roma strategiisto Germanicus, kiu havis tiel multe da laboro en . . . Germanico.*) Unuvorte: -ico estas majstroverko. Kolumbo ĉiam ankoraŭ produktas ovojn.

Kaj per tio ni do povas deklari la ujo-io-batalon definitive fermita.

Ezoketo.

*) La aŭtoro ne dubas, ke evoluinta historiscienco montras, ke en Anglujo laboris romatempe iu Anglicus, en Francujo Franciscus (eble Franciscus estas degenerinta formo de tio) ktp., ke ĝenerale la landoj per ili ricevis siajn nomojn. Komparu ankaŭ: Britujo — Britannicus!

Rimarko: Nuntempe oni ja lernas lerneje, ke en Francujo strategiis Caesar, sed tio certe aŭ estas misinformo, aŭ Caesar estis nur lia antaŭnomo.

Ĉinaj saĝaĵoj

Observu vian propran memon kaj prijuĝu laŭ ĝi la memon de la aliaj. Rigardu al via propa domo kaj prijuĝu laŭ ĝi la domon de la aliaj. Vidu vian propran kampon kaj prijuĝu laŭ ĝi la kampon de la aliaj. Ekkonu vian propran mondon kaj prijuĝu laŭ ĝi la mondon de la aliaj!

*

Kio estu kuntirata, unue devas esti etendiginta. Kion oni volas malfortigi, tio unue devas esti fariĝinta forta. Kion oni provas

Interesan Konkurson

kies temo estas: Diru vian opinion pri poezio! vi povas facile partopreni, plenumante jenajn kondiĉojn:

1. Ne pli ol 6 vortoj (ne kalkulataj estas artikolo, prepozicioj, konjunkcioj).

2. Skribu la solvon en Intersteno (laŭ la unua parto de la Gvidilo).

3. Aldonu en longa skribo la naci-lingvan tradukon.

4. Templimo estas la 31-a de Januaro 1951.

5. Uzu poŝtkarton kun pagita respondo aŭ, letere, aldonu validan internacian respondkuponon.

6. Sendu al Clemente Daglio, Campanella 51, Tortona (Aless.) Italio.

La premioj konsistas en librokreditoj ĉe UEA, SAT kaj Heroldo, inter kiuj oni povos libere elekti.

Atentu! La abonantoj de EP ricevos je demando la supre nomatan Gvidilon de Intersteno senpage de la redakcio. Intersteno, la plej simpla kaj facila internacia stenografio, jam oficiala en la parlamento kaj publikaj lernejoj de Israelo kaj instruata ankaŭ en aliaj lernejoj, taŭgas ne nur por Esperanto, sed same bone por ĉiu nacia lingvo.

Rim-sentenco

Por nutradi nin, la ter' bezonas, ke plugilo fosu en profundo. Ĝi alie kardojn sole donas, eĉ se estus plej fekunda grundo.

Kie ajn do mankas fosilaro, ne sufiĉas la tereno nura — En ni ankaŭ kreskas fi-herbaro, kiam mankas la plugil' tortura.

Dr. Rupert Scheucher

renversi, tio unue devas esti stariĝita. Kiu volas preni, unue devas doni.

Ankaŭ ciklono ne daŭras tutan tagon!

Ankaŭ pluvo ne daŭras ĝisnokte!

Veraj vortoj ne estas belaj. Belaj vortoj ne estas veraj.

Amo ne povas batali ne venkante, ne povas defendi ne ŝirmante. Al kiu volas helpi la ĉielo, ĝi helpas per la amo.

Lao Tse

(Nask. 604 a. Kr.; estis unue administranto de l' imperiestra arĥivo, sed poste tute retiris sin de la mondo. Lia verko „Tao Te Cing“, kiu prezentas la esencon de la taoisma doktrino, faris lin la sanktulo de l' taoismo.)

Logiko kaj Lingvouzo

Ekstrakto el prelego de Wilh. Wingen dum la GEA-kongreso en Mainz

La ĉi-sekvanta prelego turnas sin antaŭ ĉio al lingve spertaj esperantistoj, kiuj sendube ĝojos, ke EP per ĉi tiu publikigo konsideras ankaŭ ilian nivelon. Sed tio tamen ne fortimigu komencantojn! La simpla lingvo, la klara frazkonstruo de la konata aŭtoro eĉ instigu ilin provi legi ĉi tiun interesan artikolon pri la limoj de lingva logiko. — Red.

Hodiaŭ kiel antaŭ jardekoj tre ŝatata temo inter fervoraj esperantistoj estas diskutado, kelkfoje eĉ disputado, pri lingvaj demandoj. Kaj preskaŭ ĉiam la argumentoj por aŭ kontraŭ iu diskutata esprimo venas el la arsenalo de la logiko. Sub la devizo „Esperanto estas logika lingvo!“ oni postulas sidigu vin anstataŭ sidigu, ĉirkaŭeju anstataŭ ĉirkaŭaĵo, ĝojigan feston anstataŭ ĝojan feston, mi ne vidis ion anstataŭ mi ne vidis nenion, mi havas multon da mono anstataŭ mi havas multe da mono ktp. ktp.

Pri la grava rolo de la logiko ĝuste en lingvo internacia ne povas esti dubo. Logiko devas nin gvidi, kiam ni serĉas ĝenerale kompreneblan esprimon por nacilingvaj parolturnoj aŭ aliaj apartaĵoj. La helpon de logiko ni bezonas, kiam por nove aperintaj ideoj ni deziras krei taŭgajn vortojn el jam ekzistanta lingva materialo, anstataŭ ĉiufoje enkonduki novajn radikojn. Unuvorte: logiko ne nur garantias bonan kompreneblecon kaj korektecon de nia lingvaĵo, sed ĝi ankaŭ povas faciligi la lernadon de nia lingvo, ŝparigante al ni la encerbigon de vortoj aŭ parolturnoj. Ne mirige do, ke ĝuste la logiko ĝuas plej bonan reputacion en la popolo esperantista.

Sed kelkfoje la emo al logiko kiel plej alta instanco por decidi pri lingva problemoj forruliĝas trans la limon de praktika neceso. Jen ekzemplo, kiu bele ilustras la situacion: lutage samideano skribis al mi, ke la frazo „La inko staras sur la tablo“ estas kritikinda, ĉar „la inko ne povas stari, sed nur la inkujo“. Legante tion mi pensis: Certe, kaj se oni volas esti severe logika, oni devus eĉ diri: „Sur la tablo staras inkujo k u n i n k o“, ĉar ekzistas ja ankaŭ inkujoj malplenaj.

Tiu speco de logikemo, tre ofte renkontebla inter niaj samideanoj, jam en 1907 instigis d-ron Zamenhof skribi en unu el siaj Lingvaj Respondoj: „Oni devas memori, ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la vivo. Tial ofte pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza sed enuige peza kaj tro kabineta.“ Kaj en la sama jaro li admonis: „Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem nur katenus kaj ofte, por esprimi simplan ideon, ni devas uzi vorton dek-silaban.“ Kiel ekzemplon li citas la vorton „antaŭpublikparolataĵo“ por la kutima „parolado“ kaj demandas, certa pri nea respondo: „Cu vi aprobas tian precizan vorton?“

Plej ofte la protesto de logikulo kontraŭ iu esprimo fluas el alia fonto, kiel montras jena okazaĵo, kiu donis al mi la lastan impulson fari prelegon pri nia temo. Post grupa kunveno ni restis kvarope ĉe nia tablo por ankoraŭ iomete babilu pri lingvaj demandoj. Kiam unu el la rondo prezentis al sia najbaro tabakon, tiu repondis: „Dankon, via tabako estas tro forta por mi!“ Aŭdinte tiun repondon, alia samideano kun mieno de dubo diris: „Forta? Ne, tiun vorton vi ne povas uzi rilate tabakon. Homo, muskoloj povas esti fortaj, sed tabako — ne!“

Cu vi sentas, ke tiu argumento kontraŭ „forta“ tabako prezentas alian specon de „logiko“? Evidente la malaprobo de la vorto forta por kvalifiki tabakon baziĝas sur la opinio, ke ĉiu Esperanto-vorto havas — aŭ almenaŭ havu! — nur unu solan signifon. Ĉi tiu opinio, kvankam tre disvastiginta inter la esperantistoj, tamen estas eraro. Sian originon ĝi havis en la fakto, ke tre ofte por diversaj signifoj de nacilingva vorto ni bezonas en Esperanto esprimojn malsamajn. Ekz-e por la germana vorto Zug ni devas uzi: vagonaro, trajto, movo, ekspedicio, procesio, trinko k. a. Kaj same estas pri granda nombro da aliaj vortoj nacilingvaj. Tamen ankaŭ en Esperanto ekzistas multaj vortoj kun pluraj signifoj. Jen ekzemple tri frazoj kun la vorto „forgesi“: 1. Mi forgesis lian nomon; 2. Oni forgesis lian nomon en la listo; 3. Li forgesis sian ombrelon en la vagonaro. Ĉiufoje la vorto forgesi havas alian senceon, kvankam aŭdante la tri frazojn vi verŝajne tute ne konsciis pri tio. Sed jen la tri signifoj de la radikoj: 1. ne plu memori; 2. preterlasi; 3. restigi pro neatento.

La tereno de tiuj plursignifaj Esperanto-vortoj estas vasta, multe pli vasta ol oni ordinare imagas. Kaj inter la limoj de ĉi tiu tereno la supera leĝdonanto estas ne la logiko sed la reganta lingvouzo. Tion klare montris nia ekzemplo pri forgesi: kiam ni aplikas ĝin por la tri diversaj ideoj, ni tion faras ne laŭ konsideroj logikaj, sed pro la ĝenerala lingvouzo. Same estas pri multaj aliaj vortoj de nia lingvo. Por konvinkiĝi pri tiu fakto sufiĉas atente tralegi kelkajn paĝojn de la Plena Vortaro. En ĝiaj kolonoj vi trovas ilin, tiujn vortojn, pri kies diversaj signifoj vi ofte eĉ ne konsciis.

Konstatinte tion vi staras antaŭ nova demando: kiu havas la rajton decidi pri tio, ĉu Esperanto-vorto havas diversajn signifojn kaj kiujn signifojn ĝi havas? Alivorte, kiu kreis tiun lingvouzon, evidente ludantan tiel gravan rolon ankaŭ en Esperanto? La respondo estas simpla: ĝin kreis niaj bonaj verkistoj, precipe d-ro Zamenhof mem. Kaj nia ekzemplo pri „forgesi“ eble povas instrui nin ankaŭ pri la estiĝo de la lingvotradicio. La sekvanta rezonado pri tio ŝajnas al mi akceptebla.

Übersetzungsaufgabe Nr.18

Das Schlittschuhlaufen ist ein billiger und sehr gesunder Sport, eine Leibesübung, die den Blutumlauf und den Stoffwechsel steigert. Beim Schlittschuhlaufen werden alle Muskeln in Tätigkeit gesetzt, denn der Körper wird fortwährend bewegt, um das Gleichgewicht zu halten, und deshalb wird bald diese, bald jene Muskelgruppe, jetzt am Rumpfe, dann an den Gliedern zur Tätigkeit gebracht. Das Schlittschuhlaufen wirkt auch günstig auf die Atmungsorgane ein.

Durch das tiefe Atemholen, wozu jeder Schlittschuhläufer gezwungen ist, wird eine reine, sauerstoffreiche Luft bis in die äußersten Spitzen der Lunge geführt. Der Brustkasten wölbt und erweitert sich. Die Lunge faßt mehr Blut und der Wechselverkehr zwischen Blut und Luft, welchen die Lunge besorgt, wird ein weit lebhafterer. Dabei wird mehr Sauerstoff, das Lebenselement des Menschen, vom Blute aufgenommen, die Ernährungsfähigkeit wird gesteigert und hierdurch wiederum eine Kräftigung des Gesamtorganismus in allen Teilen herbeigeführt.

DIE Alfred-Rehtz-ECKE

Stern und Flügelrad

Wir gratulieren, Eisenbahner,
Zu dem Beschluß, den ihr gefaßt!
Wie schön, daß ihr jetzt eure Züge
Mit grünen Sternen fahren laßt!
Wie schön, daß eure kluge Leitung
Auch diese grünen Sterne liebt,
Daß sie zum Erlaube-Lernen
Den Rat und die Erlaubnis gibt!

Ihr dürft gewiß sein, Eisenbahner,
Daß ihr euch Sympathie gewinnt
Bei allen Menschen, welche Freunde
Des Friedens auf der Erde sind.
Der grüne Stern ist ja ein Mittel,
Das heller macht die dunkle Welt.
Wir danken euch, daß ihr's begriffen
Und euch in seinen Dienst gestellt!

Die Redaktion weiß nicht, zu welchem Anlaß s-ano Rehtz die obigen Verse geschrieben hat. Doch gleichviel! Die esperantofreundliche Haltung der Bundesbahn ist jedenfalls anerkennenswert.

La jarkotizon de UEA

bonvolu pagi al Cefdelegito Oscar Bünemann, Hamburg 15, Isestraße 79, poŝtkonto „Hamburg 318 83“. Ĝi estas por 1951 8.— DM por membro-abonanto (MA), 3.— por membro nur kun jarlibro (MJ), 6.— por abonanto de la gazeto „Esperanto“, sen membreco kaj jarlibro, 50.— por tutpaĝa reklamo en la jarlibro.

Bitte,

werben Sie für die
Esperanto-Post unter
Ihren Gruppenmitgliedern
und Korrespondenten!

Lieber Leser!

Auch Sie lesen jetzt schon mehrere Jahre die „Esperanto-Post“. Gewiß hat Ihnen das eine oder andere gefallen — das möchten wir jedenfalls hoffen —; aber wenn Sie Redakteur wären, so hätten Sie sicher auch manches anders gemacht. Und das, was nach Ihrer Auffassung Kritik oder Anerkennung verdient, sagen Sie uns doch bitte mit der Beantwortung der dieser Ausgabe der „Esperanto-Post“ beiliegenden Karte.

Unser aufrichtiger Wunsch ist es nämlich, uns weitgehend den Wünschen „Seiner Majestät des Lesers“ anzupassen. Dazu helfen Sie uns mit Ihrem Urteil — kurz und bündig natürlich, denn für langatmige Episteln haben Sie und wir keine Zeit; die Fragen sind auch dementsprechend gehalten. Möchte aber der eine oder andere von Ihnen trotzdem zu dem oder jenem Punkt etwas mehr sagen — bitte schön! wir wollen keinesfalls Diktatoren sein. Legen Sie dann der Karte noch ein besonderes Blatt bei, und stecken Sie beides in einen Briefumschlag.

Tun Sie uns bitte diesen Gefallen, denn Sie tun ihn ja letzten Endes sich selbst. Wir rechnen auf Sie alle, alte und neue Leser der „Esperanto-Post“.

Sollten Sie gerade keine Briefmarke zur Hand haben, so geht es diesmal auch „ohne“, ausnahmsweise. Schon jetzt besten Dank für Ihre Bemühungen!

In herzlicher Verbundenheit grüßt Sie die

Redaktion der „Esperanto-Post“

En la Universala Vortaro de Zamenhof ni trovas kiel germanlingvan tradukon por la radiko forges' nur la vorton „vergessen“, kaj same por la aliaj lingvoj nur po unu vorton. Pri diversaj signifoj de tiu Esperanta radiko la vortaro diras nenion. Sed kiam Zamenhof poste uzis la vorton forgesi laŭ la cititaj signifoj, li simple imitis la kutimojn de la naciaj lingvoj, kaj same li agis pri multaj aliaj radikoj. Komence li tion faris eble senkonscie; sed ne povas esti dubo, ke per vastampleksa uzado li tute klare ekkonis la gravecon de plursignifaj vortoj ankaŭ por Esperanto. Per tiu ekkono li troviĝis jam meze de la problemo pri „lingvouzo“, kaj ke li bone komprenis ĝian gravan rolon ankaŭ por nia lingvo, tion pruvas pluraj liaj eldiroj, el kiuj mi volas citi nur du. „Car la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna lingvouzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon ol seke teoria logikeco.“ Kaj: „Ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj esperantistoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen viva kaj tro peza.“ (Finota)

Auf dem Büchertisch

Einzelne eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

Tutmonda Adresaro de Esperantistoj. Verkita de kort. kons. Hugo Steiner. 1950. Sub la aŭspicioj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. 14×20 cm, broŝiita. Preis (einschl. Postgebühr) 12 internaciale Antwortscheine, für Deutsche 5,40 DM beim Deutschen Esperanto-Bund in München.

Dieses Adreßbuch wird vielen Sprachfreunden ein willkommener Helfer sein bei ihrer Korrespondenz in der ganzen Welt. Annähernd 80 Länder sind vertreten; das zeigt schon, daß dieses Adresenverzeichnis immerhin „tutmonda“ genannt werden darf. Eine Konkurrenz für das UEA-Jahrbuch stellt es nicht dar, denn dieses veröffentlicht ja nur die Anschriften der UEA-Delegierten; eher könnte man schon eine solche mit dem SAT-Jahrbuch annehmen. Jedenfalls könnte es der Vorläufer eines wirklich vollständigen Verzeichnisses aller Esperantisten unseres Erdballs sein, wenn... ja wenn wir eine solche internationale Organisation hätten, wie sie s-ano Steiner in seinem „Publika Letero“, der mit dem Adresaro versandt wird, andeutet. Er wünscht darin mit Recht eine Weltorganisation auf breiterer Basis als UEA, eine gemeinsame Arbeits- und Kampfesfront aller Esperantisten, in der ein jeder trotzdem seine eigene politische Einstellung behalten könnte.

Das Buch enthält außer den Adressen von Esperantisten auch noch diejenigen der Repräsentanten der IEMW, der Esperanto-Verlage und der Esperanto-Zeitungen und Zeitschriften. Man darf wohl

annehmen, daß diese Verzeichnisse dem neuesten Stand entsprechen.

In einem Artikel behandelt Steiner die Geschichte des Esperanto-Museums in Wien, und in einem andern nennt er als erste von einer neuen Universala Esperanto-Organizo zusammen mit dem „Spirita Centro“ = IEMW zu unternehmende Aufgabe die Einführung des Esperanto in alle Schulen der Welt, zunächst als Wahlfach. Ist das erreicht, so werden die Lehrpersonen für die zweite Stufe = Esperanto als Pflichtfach gewonnen sein. Das erforderliche Geld soll durch freiwilligen geringen Verzicht der Esperantisten auf Nikotin- und Alkoholgenuß aufgebracht werden.

Noch etwas zur Ausstattung des 154-seitigen Buches. Es ist maschinengeschrieben und nach dem Offset-System vervielfältigt. Die Schrift ist sauber und gut lesbar, doch haften ihr die üblichen und wohl unvermeidlichen Mängel einer solchen Arbeit an. Daß als Abkürzung für sinjorino „s“ gewählt wurde, mag aus Gründen der Kürze geschehen sein; unliebsamen Verwechslungen sind damit aber Tür und Tor geöffnet.

In sprachlicher Hinsicht wäre zu erwähnen, daß „-ujo“ nie, dagegen „-lando“ dafür verwendet wird. Abweichend davon erscheint aber „Danmarko“, jedoch nicht „Danmarka“, sondern „Dana“. Sonst finden wir „-lo“ oder die rein völkische Bezeichnung, z. B. „Lichtenstein“. (Warum nicht Lifitenstejno, das m. W. schon Robert Kreuz gebrauchte?) Und warum „Kolombio“ für „Columbia“, das seinen Namen von „Kolumbo“ hat? „Izraelo“ würde man besser für den alttestamentarischen Namen belassen und das neue Staatswesen „Israelo“ nennen. Jfb.

Gleichsam als Vorboten des nächsten Internationalen Esperanto-Kongresses 1951 in München liegen schon vor:

Instrukcioj pri aliĝo al la Kongreso mit Aliĝilo: Was soll man tun, wenn man sich anmelden will? (Man tue das vor allem möglichst bald! „Bis dat, qui cito dat“ — doppelt gibt, wer schnell gibt, das ist unser Rat.) Die angegebenen acht Punkte dürften zur Belehrung ausreichen. Die Rückseite zeigt uns die Höhe des Kongreßbeitrages für gewöhnliche Kongreßteilnehmer, deren Gattinen oder Gattinnen und für Jugendliche unter 20 Jahren. Dabei ist zu beachten, daß sich der Kongreßbeitrag zweimal erhöht, nämlich nach dem 31. 12. 1950 und nach dem 31. 3. 1951. Bis Ende des Jahres beträgt er für die oben genannten Kategorien 18, 9 und 6 DM.

Ferioj en Germanujo! „Ni deziras al vi bonan kaj agrablan veturon!“ so schließt dieser farbige, auf festem Karton gedruckte Prospekt der Deutschen Bundesbahn im Format 10 1/2 × 16 cm. Darin wird besonders auf verbilligte Fahrtmöglichkeiten für Deutsche und Ausländer hingewiesen.


Bavario. Eldonita de la ŝtata komisiito por la bavara fremdultrafiko, Munkeno.

Ein Reiseprospekt, wie er sein soll, an dem man seine Freude haben kann. Farblich, und zwar in den bayerischen Farben blau-weiß, bringt er in den Unterabteilungen „Beleco de la pejzaĝo“, „Kulturo kaj arto“, „Sporto kaj plezuro“ nicht nur den entsprechenden Text, sondern auch die treffendsten schönen Bilder in geschmackvoller Anordnung. Schließlich erfährt man auch noch allerlei über das Volk und seine Bräuche, über Unterkunft und Verpflegung, was ja für einen Touristen auch nicht ganz gleichgültig ist.

Ein paar Wörtchen noch zur sprachlichen Seite. Da ist kaum etwas zu bemerken. Statt „Palatino“ (= unu el la montetoj de Romo) würde ich sagen „Palatinato“ (Pfalz). Wer kann sich unter „superkreskitaj“ ruinoj etwas Richtiges vorstellen? Katolicismo = katolizismo. „Artstiloj“ klingt hart; warum nicht artostiloj? „Frugota“ ist zunächst unverständlich; man sucht ein Wort „frugi“. Erst dann merkt man, daß man es mit „fru-gota“ zu tun hat. „Barokaj“ ist eine ulkige Trennung. Man liest: ... ĉirkaŭata de ringo de barokaj (nächste Zeile) kaj kasteloj... Man

ENIGMO-ANGULO

Magia krado



El pesto fariĝas ŝarko

P	E	S	T	O
Ŝ	A	R	K	O

Sangu ĉiam nur unu literon!

Solvoj de la enigmoj el n-ro 9

Solvo de la enigma rado

Drako, ruino, abelo, grotto, onklo, nesto: Dragono.

Solvo de la penstasko

Kelkaj el la junuloj dorsnaĝis kaj havis la oretojn sub la surfaco de la

akvo. Nun okazis la eksplodo. En akvo sonoj etendiĝas pli rapide ol en aero. Tial tiuj junuloj aŭdis la eksplodon unue tra la akvo; kompreneble ili levis la kapon el la akvo por rigardi, kaj tiam ili aŭdis la eksplodon duafoje: tra la aero.

Pres-eraroj

1. Balo, 2. buŝon, 3. seĝo, 4. rizon, 5. kafejo, 6. ravas.

Dekdu ŝerc-demandoj

1. Filino, 2. fiŝo, 3. dekduon, 4. la vintr-o, 5. la ununombro, 6. la hedero, 7. jes - truon, 8 ĉar ĝi havas tiom da sendormaj noktoj, 9. falsa monero, 10. la eĥo, 11. la haringo, 12. la kamparano.

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstraße 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort in Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17. Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

Bonvolu meti la literojn a, a, a, a — c, c — d, d — e, e, e, e — i, i, i — l, l — m, m — n, n, n — o, o, o, o, o — p, p, p, p — t en la kampojn de la ĉi-supra figuro, tiel ke horizontale kaj vertikale estiĝas la samaj vortoj. La vortoj signifas:

1. atestanta dokumento oficiala,
2. alea arbo,
3. titolo de la kardinaloj (sen gramatika finaĵo).

Hans Fricke, Frankfurt M.

Erik Stasitos

Koeln

Kian profesion havas sinjoro Stasitos?

(Büchertisch, Schluß)

stutzt; erst dann erstehen die „barokaj“ kasteloj.

Aber, wie gesagt, diese paar Sächelchen können in keiner Weise den Wert dieses ausgezeichneten Werbeblatts mindern. All diese Werbesachen kann man vom Deutschen Esperanto-Bund in München gegen Portoerstattung erhalten.

Jfb.

Bundestag der Deutschen Friedensgesellschaft in Köln vom 14. bis 17. September 1950. Festliches Heft mit Bildern von Dr. h. c. von Schoenaich und Prof. Dr. Anna Siemsen und interessanten Beiträgen zur Friedensfrage. Darunter finden wir auch einen über die Bedeutung von Esperanto für die Friedensarbeit. Er trägt den Titel „Friede auf Erden den Menschen, die eines guten Willens sind“ und ist von Jfb.

Mm.

KLM. Ein Werbeblatt der Königlich Niederländischen Luftverkehrsgesellschaft. In Esperanto natürlich. Esperanto — die sprachliche Verbindung der Völker, KLM — die Luftverbindung der Länder, die bereits im Jahre 1919 begann, dreimal wöchentlich mit je zwei Fluggästen zwischen London und Amsterdam.

Der Text wird durch ein interessantes Luftriesen-Foto belebt. Der Prospekt ist gleichzeitig schon ein Gruß an die Teilnehmer des 36. Weltkongresses in München. Nur eine quälende Frage bleibt ungelöst: Was heißt eigentlich KLM?

Mm.



Flugblätter stehen jetzt den Esperanto-Gruppen und allen Esperantisten zur Verfügung: „Esperanto auf einem Blatt“, das schon in zweiter Auflage erscheint und beim Bezug von über 500 Stück nur 3 Pfennig kostet. Dazu ein neues kleineres im Format Din A 5 „Unser Weg“ das bis 500 Stück 3 und darüber 2 Pf kostet. Aus jeder Gruppenkasse kann dieses Werbematerial für Esperanto beschafft werden. Bitte beachten Sie unsere folgenden Anzeigen! Wir geben noch weitere Werbemittel für verschiedene Gelegenheiten heraus.

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei
Limburg/Lahn

Es gibt viele Esperanto-Lehrbücher
aber das Ihrige steht an der Spitze!

So schreibt uns ein langjähriger Benutzer über unser Lehrbuch von Wilhelm und Hans Wingen „Wir lernen Esperanto“. Wer es kennt, wird dieses Urteil bestätigen, wer es nicht kennt, möge beim nächsten Kursus einen Versuch damit machen. Es ist in allen Buchhandlungen oder direkt beim Verlag erhältlich und kostet 2,— DM zuzüglich Porto. Ein alphabetisches Wörterverzeichnis ist beigelegt, und auf Wunsch wird ein Merkblatt für Unterrichtsleiter mitgesandt. Zum Selbstunterricht gibt es einen Schlüssel zum Preise von voraussichtlich 80 Pfennig

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH
Limburg/Lahn